

Protokolo de estrara interkonsiligo de Norvega Esperantista Ligo

Lundon la 17-an de junio 2019 per Skype

Partoprenis:

Mario Machlik kaj Amelie Matt (Tromsø)

Jardar Eggesbø Abrahamsen kaj Herman Ranes (Trondheim)

Bård Hekland (Bergen), parte forestis dum punkto 3

Lars Sandbakk (Sandnes)

Antaŭanoncis nepartoprenon Claude Rouget (Tromsø)

0. Tagordo

Aprobata, kun aldona punkto pri Anne Karin Bondhus

Mario Machlik salutis la novan estraron.

0. b Morto de Anne Karin

Mortis nia multjara kasisto Anne Karin Bondhus pro kancero. Anne Karin estis diversmaniere movade aktiva de 1984. Jardar kaj Lars cheestis la entombigon, ankaŭ membroj de La Vanelo. Jardar faris paroladon kiel amiko kaj nome de NEL. Estis varma etoso kaj plena preghejo.

Lars mendis florkronon, la fakturo estos sendata al NEL. Jardar tradukos la salutvortojn, kiujn ni aperigos en la venonta NE-isto. Lars respondecas pri nekrologo por la sekva NE-isto, li konsultos kun Kjell Heggvold Ullestad kaj la Bryne-anoj. La nekrologo enhavu precizajn kaj detalajn informojn.

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiligo la 6-an de majo

Aprobata

2. Landa Kongreso 2019 kaj sekvaj farendajhoj

La landa kongreso okazis sukcese en Tromsø, kun bona etoso kaj konstruaj diskutoj.

2. a Registrado de nova estraro

Herman prizorgos tion che Brønnøysundregistret.

2. b Kontoaliro por la nova kasisto

Ne estis traktita, pro la deziro de Claude, ke la estraro unue pritraktu la jarkalkulan strukturon. Dume Douglas havas aliron al la konto kaj funkcias kiel provizora kasisto kaj registranto de membroj.

2. c Protokolo

Amelie prilaboris ghin, kaj aliaj komentis. Necesas aldoni norveglingvan parton pri la elektoj. La protokolo poste estu sendata al Herman kaj Marianne por subskriboj. Prizorgos tion Amelie kaj Mario.

2. d Jarraporto kaj jarkalkulo 2017

La jarraporto kaj jarkalkulo por 2017 estis aprobitaj en Tromsø (la lasta kondiĉe de revizora aprobo). Claude poste atentigis pri eraro en la kalkulo. La kalkulo estu ghustigita kaj post aprobo afishita en la retejo, kune kun la fina versio de la jarraporto kaj la protokolo. Prizorgos tion Mario.

2. e Laborplano

La laborplano por 2019 ghis 2021 estis aprobita en la landa kunsido. Mario prizorgos, ke ghi afishighos en la retejo.

3. Nova strukturo de jarkalkulo

Claude proponis novan strukturon por la jarkalkulo kaj librotenado, multe simpligitan. La estraranoj konsentas, ke endas simpligi la ekonomian sistemon de la asocio. Necesas orda transiro, kun atento al eventualaj retenindaj eroj. La estraro proponas sendi kaj la malnovsisteman kalkulon de Anne Karin por 2017 kaj la simpligitan de Claude por la sama jaro al la revizoro por komentoj.

Budgheto: La estraro konsideris, ke tio ne urghas nun. Ni pretigu formalan budgheton por la sekva landa kunveno.

4. Studorganizo

NEL restos membro de nia nuna studorganizo en 2019. Jardar kaj Douglas esploros nome de GET kaj la Oslo-klubo la alternativojn.

5. Asekuro de Esperantonia

La demando estas plusendata al la domkomisiono, kie NEL-on reprezentas Herman.

6. Membreco en FN-sambandet

Ne estis fortaj opinioj inter la estraranoj. Oni vidis argumentojn por aktivi en tiu rondo, sed dependas de kapacito. Ni restos membroj en 2019 kaj provos aktivigi membrojn, ĉefe en Oslo.

7. Salutanto dum UK

Herman Raner salutis nome de NEL.

8. Eventualajhoj

Lars informis, ke vizitos korea esperantisto en Stavanger venontvendrede.

La klubo de Stavanger havas bankkonton kun pr. 5000 kronoj, sed ne estas formala kluba aktivado. La membroj povus ankaŭ esti rektaj membroj de NEL. La NEL-estraro tamen ne vidas urghan bezonon formale malfondi la klubon, prefere ni restu flekseblaj, kiel ankaŭ pri la klubo de Bergen.

Kurso en Skien estis anoncita en majo. La estraro tamen ne estas informita pri la rezulto.

La interkonsiligo daŭris de 20:00 ĝis 22:00

La venonta interkonsiligo okazos ĵaŭdon la 29-an de aŭgusto je 20:00

Protokolis: Bård Hekland